

Okdek jaroj de esperanta vivo, 2-a parto
La Unua Libro
Claude Gacond, 170-a radioprelego, 1967.01.11 & 1967.01.14

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la **Unuan libron** de nia lingvo. Ĝi estis eldonita antaŭ okdek jaroj en 1887. Ni hodiaŭ ekzamenis la penson de ĝia aŭtoro Zamenhof per analizo aŭ citado de liaj antaŭparolaj diroj.

A.- Unue Zamenhof petas la leganton forlasi siajn antaŭjuĝojn. Lian demonstiron nur povos sekvi homo kapabla science pensi.

Cl.- Por Zamenhof la lingvo internacia devas esti pli ol nura helpa lingvo. Ĝi signifas kulturan progreson. Aŭdu :

A.- « *Devigataj dividi nian tempon inter diversaj lingvoj, ni ne havas la eblon deĉe fordoni nin eĉ al unu el ili, kaj tial de unu flanko tre malofte iu el ni posedas perfekte eĉ sian patran lingvon, kaj de la dua flanko la lingvoj mem ne povas deĉe ellaboriĝi, kaj, parolante en nia patra lingvo, ni ofte estas devigataj aŭ preni vortojn kaj esprimojn de fremdaj popoloj, aŭ esprimi nin neprecize kaj eĉ pensi lame dank'al la nesufiĉeco de la lingvo.*

Cl.- Zamenhof daŭrigas :

A.- *Alia afero estas, se ĉiuj el ni havas nur du lingvojn, - tiam ni pli bone ilin posedas kaj tiuj ĉi lingvoj mem povas pli ellaboriĝadi kaj perfektigi kaj staras multe pli alte, ol ĉiu el ili staras nun.*

Cl.- Kaj li konkludas :

A.- *Kaj la lingvo ja estas la ĉefa motoro de la civilizacio : dank'al la lingvo ni tiel altiĝis super la bestoj, kaj ju pli alte staras la lingvo, des pli rapide progresas la popolo. »*

Cl.- Zamenhof poste raportas pri la lingvoj en la interpopola konduto. Jen aserto bedaŭrinde restinta plene aktuala :

A.- « *Renkontiĝante kun homoj, ni ne demandas, kiujn politikajn konvinkojn ili havas, sur kiu parto de la tera globo ili naskiĝis, kie loĝis iliaj prapatroj antaŭ kelkaj miljaroj : sed tiuj ĉi homoj ekparolas, kaj ĉiu sono de ilia parolo memorigas nin, ke ili estas fremdaj por ni. »*

Cl.- Zamenhof tiel prezentas sian kontribuon al la demando pri lingvo internacia :

A.- « *Sentante min nek pli talenta, nek pli energia, ol la aŭtoroj de ĉiuj senfrukte pereintaj provoj, mi longan tempon limigadis min nur per revado kaj nevola meditado super tiu ĉi afero.*

Cl.- *Sed kelkaj feliĉaj ideoj, kiuj aperis kiel frukto de tiu ĉi nevola meditado, kuraĝigis min por plua laborado kaj igis min ekprovi, ĉu ne prosperos al mi sistemo venki ĉiujn barojn por la kreo kaj enkonduko en uzadon de racia lingvo internacia.*

A.- *Ŝajnas al mi, li daŭrigas, ke tiu afero iom prosperis al mi, kaj tiun ĉi frukton de longtempaj persistaj laboroj mi proponas nun al la prijuĝo de la leganta mondo. »*

Cl.- Zamenhof mencias problemojn, kiujn li devis solvi :

A.- La lingvo devas esti eksterordinare facila.

Cl.- Ĉiu, kiu ellernas tiun ĉi lingvon, devas povi ĝin tuj uzi por la kompreniĝo kun homoj de diversaj nacioj. La lingvo jam de la komenco, dank'al sia konstruo, devas povi servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikoj.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 2-a parto
La Unua Libro
Claude Gacond, 170-a radioprelego, 1967.01.11 & 1967.01.14

A.- Necesas trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la publiko.

Cl.- Pri la simpleco de la lingvo, kiun li proponas, Zamenhof faras averton citindan :

A.- *« Mi scias la inklinon de la plimulto da homoj rigardi aferon kun des pli da estimo, ju pli ĝi estas komplika, ampleksa kaj malfacile digestebla.*

Cl.- Kaj li daŭrigas : *Tiuj personoj, ekvidinte la malgrandan lernolibron kun plej simplaj kaj por ĉiuj plej kompreneblaj reguloj, povas preni la aferon kun ia malestima malŝato, dum ĝuste la atingo de tiu ĉi simpleco kaj mallongeco, la enkonduko de ĉiu objekto el la formoj komplikitaj, el kiuj ili naskiĝis, al la formoj plej facilaj – prezentis la plej malfacilan parton de la laboro. »*

A.- En la dua parto de sia antaŭparolo Zamenhof donas interesajn klarigojn.

Cl.- Ĝuste koncerne al la facileco, li klarigas, ke li simpligis ĝis nekredebleco la gramatikon, provante tamen neniom depreni per tio al la klareco, precizeco kaj fleksebleco de la lingvo. Li kreis regulojn por vortfarado, kiuj igas la lingvon pli riĉa, ol la plej riĉaj naturaj lingvoj.

A.- Sed estis necese eviti, ke tiu kreita racia lingvo ŝajnu tro fremda al la eŭropa publiko. Jen tiurilate interesa klarigo de Zamenhof pri la originaleco de lia proponita lingvo internacia :

Cl.- *« Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstaraj vortoj, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el sensanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj estas esprimataj per la kunigo de sensanĝaj vortoj.*

A.- Kaj li atentigas : *Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.*

Cl.- Tiurilate la lingvo de Doktoro Esperanto parencas al aziaj lingvoj ĉu aglutinaj kiel la turka, ĉu izolivaj kiel la ĉina.

A.- Fine de sia antaŭparolo Zamenhof, post detalega priskribo de sia lingvo, optimisme antaŭvidas ĝian evolu-kapablon. Lia certeco pri la vivopovo de lia lingvo-projekto estas bazita sur objektiva pensado kaj lingvoesploro. Dum tiu ĉi jaro ni havos la okazon reveni al tiu temo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-